L'iniciatinto de la internacia lingvo Zamenhof memorigita en Pollando

La disvastiĝo de Esperanto dank'al krema-a Marignoni

de Davide Astori

Daniele Marignoni, la intelektulo kiu enkondukis Esperanton en Italujo, estis civitano el urbo Kremo (Crema). Intertempe en la pasintaj tagoj Eŭropo memorigis Ludwig L. Zamenhof, la iniciatinton de Esperanto.

Post 125 jaroj de ĝia kreo, la demokratia idealo de la planita internacia lingvo daŭre estigas debatojn kaj prikonsiderojn. Kaj pro la fakto, ke li estis rekonita en Pollando inter la plej grandaj naciaj famuloj, kaj ĉar en la mondo lia nomo estas, ĉiukaze, profunde ligita al la utopio de egaleco kaj justeco, ankaŭ sur lingva nivelo (tiom ke, pasintjare, li gajnis al si mem la paĝon de la tago fare de Gouglo), okaze de la datreveno de lia naskiĝo, la 15an de decembro, la Retejo de la pola Prezidanteco de la eŭropa Konsilio (taksita ekde la pasinta 1a de julio ĝis la 30a de decembro) dediĉis al Lazaro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la internacia lingvo Esperanto, mallongan memorvekan tekston aperigitan en kvar lingvoj (pola, angla, franca kaj germana), renovigante la atenton jam dediĉitan la pasintan 26an de julio memore al la eldono de Unua Libro (la unua koncerna eldono en 'internacia lingvo') ĝuste en Varsovio.

Naskiĝinte en la pola Bjalistoko, d-ro Zamenhof, spertinte en sia juneco - kiel raportas la biografioj - la malfacilajn rilatojn inter malsamaj lingvoj, kulturoj kaj religioj, tuj ekrevis krei, kiel esprimas la vortoj de la bela



La krema-a **DanieleMarignoni**

Lernolibro de **Esperanto**

libro de Vitaliano Lamberti, «**Unu voĉo por la mondo**» cele proponi al la homaro pluan instrumenton por la akirado de la tutmonda bonfarto, ankaŭ pere de la superado de ĉiu ajna etna, lingva, socia, religia barilo inter la gentoj.

Kaj ekde la 1887a, jaro en kiu vidis la lumon ĝuste la **Unua Libro**, post 125 jaroj la revo de Zamenhof prezentiĝas al la konsciencoj (inter eldonaĵoj, kuvenoj, kongresoj, TTT-ejoj, forumoj) provokante debatojn kaj konsiderojn pri la graveco de la demokratio kaj de la lingva ekologio, pliigante en pli vasta senco ĝian valorriĉan enprofundiĝon kiu igis la polan kuraciston esti konsiderita, en 1959, inter la grandaj personecoj de Unesko, institucio kiu adoptis, en 1954 kaj en 1985, du rezoluciojn favore de tiu planlingvo, redeklarante la valoron de tia kontribuaĵo favore al interkomunikado kaj al dialogo inter la diversaj kulturoj kaj mondkonceptoj.

Ankaŭ Kremono montris intereson pri la esperantista propono: li naskiĝis en urbo Kremo (Crema), la 1an de januaro 1846

kaj tie loĝis dum la tuta vivo, ĝis la morto kiu okazis la 28an de januaro 1910, Daniele Marignoni, la viro kiu, kiel recitas la marmora memorŝtono al li dediĉita en la funebra templeto (Famedio), la urbodoma monumento de la elstaraj krema-aj civitanoj, «enkondukis Esperanton en Italujo». Kaj pri Kremono (Cremona) oni povas diri, ke jam ekde 1916 okazis tie la unua esperantista agado, informo plue atestita, en 1925, fare de la rekomendo de la urba Komerca Ĉambro al aliaj Komercaj Ĉambroj uzi Esperanton okaze de la aliĝo al la dua internacia konferenco pri la komerca helplingvo okazinta tiun jaron en Parizo.

Kaj jen la figuro de Marignoni kaj mallonga skizo pri la historio de la kremona esperantismo estis antaŭnelonge ĵus prezentita en Kopenhago dum la Universala Esperanto Kongreso pasintjulie.